

# NORDFRANCA

# ESPERANTISTO

(PIKARDA STELO - NORDA GAZETO - ANTAŬEN)



## MONATA REVUO

de la Nordfrancaj Esperantistoj

Publikigas la setigojn de la Norda Federacio  
kaj de la Grupoj

## REVUE MENSUELLE

des Espérantistes du Nord de la France

Publie les renseignements  
de la Fédération du Nord et des Groupes



Redaktejo kaj administrejo:  
18, rue Albert 1<sup>er</sup> - DUNKERQUE (Nord)  
C. VERNAY, Direktoro-Prirespondanto  
G. VANHOVE, Administrinto

*Redakta Komitato, redaktas*

Jarabono: Francujo 10 frankoj  
aliaj landoj: 8 respondkuponoj aŭ egalvaloro  
POŬTCEKKONTO: LILLE 403-50  
G. VERNAY, DUNKERQUE



Les bonnes adresses de Dunkerque...

**KODAKS**  
PHOTO-AMATEURS

**CAYEZ**

9<sup>bis</sup>, Rue Clémenceau - DUNKERQUE

Travaux - Agrandissements  
Stocks de toutes marques  
Esperanto parolata

ATELIER DE RELIURE ET CARTONNAGE  
(Fondé en 1860)

**Louis BLOT**

10, Rue Dupouy, DUNKERQUE

Reliure en tous genres  
de luxe et d'amateur  
Esperanto parolata

IMPRIMÉS EN TOUS GENRES - PAPIERS

RELIURE - GRAVURE

Fournitures classiques et de bureau

**Librairie du Beffroi**

Albums et Timbres pour Collectionneurs  
Livres - Insignes Espérantistes

**MOREAU-FOURMEUX**

28, Rue Clémenceau, DUNKERQUE

"Au Roi du Saucisson"

**Roger BRATS**

30, Rue Michelet  
COUDEKERQUE-BRANCHE

Fromages, Conserves, Confitures  
Vente sur tous les Marchés de la Région

Fabrique de Casquettes  
BÉRETS - CHAPEAUX

**EDMOND**

Chapelier

38, Rue Poincaré - DUNKERQUE

"Les BLEUETS"

26, Rue Poincaré - DUNKERQUE

**Blanche RAMOUT**

Fleuriste

Vous y fournir, c'est affirmer votre bon goût  
Choix de Plantes - Cerbeilles  
Gerbes et Bouquets

**Les Coopérateurs**  
de Flandre et d'Artois

3, route de Bergues - Coudekerque-Branche

La Coopération est le moyen idéal de  
répartition des produits de consommation  
Adhérez tous à la Coopération pour défendre  
vos intérêts

Depuis sa fondation, notre Société a payé  
à ses adhérents plus de 40 millions francs  
de ristournes et d'allocations (naissances,  
maladies, décès).

La Coopération est un Syndicat  
de Consommateurs

LES COOPÉRATEURS vendent à tous :  
actionnaires ou non

Nos magasins sont ravitaillés chaque matin  
en PAIN d'excellente qualité (vendu 0 fr. 10  
au-dessous de la taxe officielle).  
en LAIT FRAIS PASTEURISÉ.

**Tout l'HABILLEMENT**

Hommes, Jeunes Gens  
Enfants

**AU BON VÊTEMENT**

Maison O. ROZEN

17, Rue des Chaudronniers

DUNKERQUE

Esperanto parolata

**BIJOUTERIE**

**Georges MAEGHT**

9, Rue Clémenceau, DUNKERQUE

Choix énorme de Bagues de fiançailles  
Alliances et Cadeaux de mariages  
Rabato al niaj Samideanoj

# NORDFRANCA ESPERANTISTO

Monata Revuo de la Nordfrancaj Esperantistoj

2 a Serio - 15 a Jaro

Noj 5-6

MARTO-APRIL 1938

**Jen du manifestacioj al kiuj,  
ĉiuj la esperantistoj de nia federacio partoprenos :**

- Inaŭguro de la Esperantista Biblioteko en SAINT-OMER la 10an de APRIL 1938;
- La 19a Esperanto-Kongreso de la Norda Federacio en LENS, la 7an kaj 8an de MAJO 1938.

(Legu la detalojn sur la sekvantaj paĝoj.)



La Urbodomo en Lens,

kie okazos, la 7an kaj 8an de Majo 1938 nia Nordfranca Federacia Kongreso. Notinde estas ke la Urbestraro multe helpas al niaj samideanoj. La kongreso okazos samtempe kun la granda Foiro en Lens, Do, ĉiuj en Lens !



## 19<sup>me</sup> Congrès annuel de la Fédération Espérantiste du Nord de la France

*Chers Samideanoj,*

Nous avons le plaisir de vous informer que notre 19<sup>me</sup> Congrès Fédéral se tiendra à l'Hôtel de Ville de Lens, les 7 et 8 mai prochain avec la présidence assurée de la Municipalité de Lens et des Maîtres de l'Enseignement.

Les dates ci-dessus ont été choisies pour coïncider avec la Foire de Lens.

Nous vous invitons cordialement à ce Congrès et comptons que vous voudrez bien en rehausser l'éclat par votre présence.

Le Comité organisateur du Congrès fait tout ses efforts pour que vous soyez entièrement satisfait et que vous conserviez un excellent souvenir de ce Congrès. Nous sommes persuadés que vous ne regretterez pas les quelques journées que vous passerez au milieu de camarades espérantistes de tous pays.

D'ores et déjà plus de cent personnes sont inscrites et beaucoup de personnalités nous ont promis d'y assister.

Dans l'espoir que vous voudrez bien répondre à notre cordiale et pressante invitation, nous vous prions de croire, chers samideanoj, à nos meilleurs sentiments espérantistes.

*Groupe Espérantiste Lensois "Zamenhof".*

## Alvoko. - LENS KONGRESOS !

Denove la verda familio de la geesperantistoj festos !

La 7an kaj 8an de majo, en Lens, okazos la 19a Nordfranca Esperantista Kongreso; la loka Grupo "Zamenhof" faras varmegan alvokon al ĉiuj geesperantistoj kaj invitas ilin partopreni tiun kongreson.

Por certigi ĝian sukceson via ĉesto estas pli ol necesa, ĉar temas ne nur pri sukceso de la kongreso sed ankaŭ pri triumfo de nia kara lingvo.

Do, karaj gesamideanoj de diversaj regionoj, kiuj flamas je la sama idealista fajro, ne malatentu nian varmegan alvokon kaj partoprenu amase nian kongreson, kiu estas ankaŭ la via, La Grupo rezervas al vi la plej koran kaj amikan akcepton.

Ni fidas al vi kaj estas certaj pri via alveno kaj ĉesto al la 19a kongreso federacia en Lens. La Grupo "Zamenhof" tutkore salutas vin kaj formulas la esperon vidi multnombrajn gesamideanojn en la kongreso dum kiu oni ankaŭ festos la 30an datrevenon de la fondo de nia Federacio.

Sendu tiuj vian aliĝon (5 F.F.) al S-ro C. Vala, 85, boulevard Emile-Basly en Lens (P.-de-C.) postĉekkonto 78-33 Lille.

*La Komitato de la Esperantista Grupo "Zamenhof" en Lens,  
La Prezidanto : Max MENDLEWICZ.*

## 19° Nordfederacia Kongreso

### PROGRAMME

#### SAMEDI.

- 15 heures. — Examens de la S.F.P.E. (Hôtel de Ville).
- 17 h. 30. — Visite des Mines de Lens.
- 20 h. 30. — Réunion amicale (Grand-Hôtel).

#### DIMANCHE.

- 8 heures. — Réception des Congressistes.
- 9 heures. — Concours "Fervorigilo" (Hôtel de Ville).
- 10 heures. — Assemblée générale (Hôtel de Ville).
- 12 heures. — Réception à l'Hôtel de Ville.
- 12 h. 30. — Photographie.
- 12 h. 45. — Défilé au Monument.
- 13 h. 15. — Réception officielle par le Comité de la Foire de Lens.
- 14 heures. — Banquet officiel (Prix 22 francs) Salle l'Alhambra.
- 16 h. 30. — Visite de la Foire Commerciale de Lens.
- 17 h. 30. — Représentations : Cinéma (Antaŭen), Théâtre, Concert et Sauterie.

## LENS

### Renseignements généraux

*Population.* — Au recensement de 1936, la population de Lens était de 32.730 habitants. La ville, située au cœur de la région minière du Pas-de-Calais, la région de France la plus peuplée — 541.695 habitants pour le seul arrondissement de Béthune — est le centre d'une agglomération de plus de 250.000 habitants.

*Historique.* — En latin Lentium ou Lendum, la ville, fondée, croit-on par un proconsul romain était au XI<sup>me</sup> siècle, chef-lieu de Comté et appartenait au père de Godefroy de Bouillon. Apportée en dot par Isabelle de Hainaut à Philippe Auguste, elle fut réunie à la couronne de France en 1192 et dotée d'une charte par Louis VIII. Aux 15<sup>e</sup>, 16<sup>e</sup> et 17<sup>e</sup> siècles, elle subit les sièges des Flamands, des Bourguignons, des Français et des Espagnols. Elle ne devint française que par la paix des Pyrénées, en 1659.

Lors de la grande guerre de 1914-1918, Lens, dès le 4 octobre 1914, après les combats autour de Douai, fut occupée par les Allemands pendant quatre ans. Elle fut complètement détruite et ne fut délivrée que le 3 octobre 1918. Lens a reçu la Croix de la Légion d'Honneur et la Croix de guerre, avec la belle citation suivante :

« Ville glorieuse qui peut être citée comme un modèle d'héroïsme et de foi patriotique

« Tombée au pouvoir des Allemands dès les premières heures de l'invasion de 1914, a été pendant quatre ans, tour à tour témoin ou enjeu d'une lutte sans merci.

« Organisée par l'ennemi en formidable redoute de défense, libérée en partie par une offensive alliée, mutilée et écrasée au cours de combats incessants, n'a jamais douté du sort de la Patrie. »

*Commerce et Industrie.* — Centre d'affaires très important. Commerce de grains, brasseries, câblerie et tréfilerie, tonnellerie, fonderie... Lens vit surtout de l'industrie houillère, remarquablement développée.



Son sous-sol appartenant aux riches bassins houillers du Nord de l'Europe, qui commencent près d'Aix-la-Chapelle pour aboutir au Nord de Boulogne et se continuer en Angleterre par delà le détroit, est le siège d'une vie intense. Les Mines de Lens peuvent être considérées comme les plus importantes de France.

*Excursions.* — Lens, qui est située à courte distance des anciens champs de bataille de l'Artois est un centre très important d'excursions vers le cimetière national de Notre-Dame de Lorette, le Monument Canadien et les tranchées de Vimy, Souchez, La Targette, Neuville-Saint-Vaast.

Des services spéciaux d'autocars fonctionnent, pendant la période Mai-Septembre, à destination de Lorette et de Vimy. La ville possède d'excellents hôtels et restaurants.

### Adhérents au Congrès de Lens des 7 et 8 Mai 1938

#### PREMIÈRE LISTE

- |   |   |
|---|---|
| 1 M. Vernay (Dunkerque).                                  | 39 M. Dammerey (Borre).                       |
| 2 M. Humez (Douai).                                       | 40 M. Taire (Amiens).                         |
| 3 M <sup>me</sup> Humez (Douai).                          | 41 M. Saintes (Amiens).                       |
| 4 M. Deligny (St-Omer).                                   | 42 M. Léchelle (Vicq par Fresnes-sur-Escaut). |
| 5 M <sup>me</sup> Deligny (St-Omer).                      | 43 M. Azambre (Maroilles).                    |
| 6 M. Centnersver (Valenciennes).                          | 44 M. Mouque (Lens).                          |
| 7 M. Delavigne (Longpré - les Corps-Saints).              | 45 M. Blanchet (Avesnes).                     |
| 8 M <sup>me</sup> Delavigne (Longpré - les Corps-Saints). | 46 M. Aucerne (Lille).                        |
| 9 D <sup>r</sup> Dumoulin (Douai).                        | 47 M <sup>me</sup> Aucerne (Lille).           |
| 10 M. Couteau (Avesnes).                                  | 48 M. Bouvier (Poix).                         |
| 11 M <sup>me</sup> Couteau (Avesnes).                     | 49 M. Irlande (Poix).                         |
| 12 M. Flaczinski (Bruay-en-Art <sup>s</sup> ).            | 50 M <sup>me</sup> Irlande (Poix).            |
| 13 M. Bialasik (Bruay-en-Artois).                         | 51 M <sup>me</sup> Kiescoms (Dunkerque).      |
| 14 M. Novak (Bruay-en-Artois).                            | 52 M. Max (Lens).                             |
| 15 M <sup>me</sup> Lognon (Arras).                        | 53 M <sup>me</sup> Max (Lens).                |
| 16 M <sup>me</sup> Tyveyra (Arras).                       | 54 M <sup>me</sup> Mohr (Lens).               |
| 17 M. Frydman (Lens).                                     | 55 M. Dubois E. (Lens).                       |
| 18 M. Carlier (Lens).                                     | 56 M. Babaskerof (Lens).                      |
| 19 M. Morlighem (Liévin).                                 | 57 M. Macke (Arras).                          |
| 20 M. Kert (Boulogne-sur-Mer).                            | 58 M. Brunet (Arras).                         |
| 21 M. Labiche (Boulogne-s/Mer).                           | 59 M. Leloir (Malo).                          |
| 22 M. Couret R. (Boulogne-s/Mer).                         | 60 M. Dumarquez (Desvres).                    |
| 23 M <sup>me</sup> Leclercq (Boulogne-s/Mer).             | 61 M <sup>me</sup> Dumarquez (Desvres).       |
| 24 M. Gaudin M. (Boulogne-s/M.)                           | 62 M <sup>me</sup> Denis (Rosendaël).         |
| 25 M. Lepetit (Boulogne-s/Mer).                           | 63 M <sup>me</sup> Schleider (Lens).          |
| 26 M <sup>me</sup> Victor (Amiens).                       | 64 M <sup>me</sup> Lieber (Lens).             |
| 27 M <sup>me</sup> Colléatte (Amiens).                    | 65 M. Prangère (Douai).                       |
| 28 M <sup>me</sup> Chantemesse (Amiens).                  | 66 M <sup>me</sup> Prangère (Douai).          |
| 29 M. Lekieffre (Anzin).                                  | 67 M. Aldebert (Fresnes-s/Esc <sup>t</sup> ). |
| 30 M <sup>me</sup> Degand (Dunkerque).                    | 68 M. Platey (Rosendaël).                     |
| 31 M <sup>me</sup> Vanhersecke (Dunkerque).               | 69 M <sup>me</sup> Platey (Rosendaël).        |
| 32 M <sup>me</sup> Couget (Dunkerque).                    | 70 M <sup>me</sup> J. Pocquet (Lens).         |
| 33 M <sup>me</sup> Spyns (Dunkerque).                     | 71 M <sup>me</sup> Y. Pocquet (Lens).         |
| 34 M <sup>me</sup> Deblock (Dunkerque).                   | 72 M <sup>me</sup> Duhem (Amiens).            |
| 35 M <sup>me</sup> Braure (Dunkerque).                    | 73 M <sup>me</sup> Spiolek (Lens).            |
| 36 M <sup>me</sup> Pauwels (Dunkerque).                   | 74 M. Desmarest (Huby-St-Leu).                |
| 37 M. Houzé (Dunkerque).                                  |   |
| 38 M. Lemoine (Dunkerque).                                |   |

(à suivre).

## NI DAŬRIGU !...

### Frateco (Guyau)

Iu brava farmisto, loganta en la montoj, estis foririnta, iun matenon, je la ektagiĝo, por viziti sian fraton, kiu restadis ne malproksime de tie.

Malsuprenirante en la valon, li trovis sin ĉirkaŭvolvita per unu el tiuj densaj nebuloj, kiuj donas al la objektoj la aspektojn plej erarigajn kaj kelkefoje plej fantaziegajn.

Post kelkaj momentoj, li ekvidis, alvenante al li per rapidaj paŝoj strangan estaĵon, kun monstraj formoj. Ĉu estis ia nekonata besto, aŭ unu el tiuj diaĵoj malbonfaremaj, kiuj, laŭ la superstiĉaj tradicioj de tiu lando, estis en la pasinta tempo loĝintaj tie ?

Nia bravulo ne sciis, kion opini, sed ne temis pri malantaŭeniro. Li decideme paŝis al la malamiko, premante kun pli da forto en sia mano la tuberan bastonon, per kiu li estis provizita. Cetere, la malamiko agis en sama maniero ; sed, proporcie kiel li alproksimiĝas, lia staturo kaj lia formo ŝanĝiĝas, kaj, iom post iom, li ŝajnas esti simpla mortemulo.

Jam la farmisto, observante lin atente, sin demandis, sume, ĉu li ne estus nura homo, kaj eĉ samlandano, kiam subite, la matenvento, disiginte la nebulon, kaj la suno, kiu ĵus estis superiranta la monton, absendinte siajn radiojn sur la nekonatan vizaĝon, la kamparano eligis krion, al kiu, sammomente, respondis alia simila krio : ne nur li vidas antaŭ li homon kaj samlandanon sed ankaŭ sian fraton, sian propran fraton, kiu, instigita de sama intenco, ĵus forlasis sian monton.

Ambaŭ same eraris, kaj ambaŭ, en la sama momento post kiam ĉiu estis irinta la duonon de la vojo, ĵus ekvidis kiom ili iluziis : en tiu, kiun ili opiniis esti malamiko, ili havas la ĝojon renkonti fraton.

Karaj geamikoj ! Leginte tiun rakonton mi ne povis ne pensi pri la nuna stato de la mondo. La du fratoj de la fabelo similas al la popoloj tutmondaj. Ili marŝas unu kontraŭ la alian kiel malamikoj, ili amase kolektas armilojn ĉiuspecajn : pafiloj, maŝinpafiloj, kanonoj, kano-negoj, haŭbizoj, eksplodaĵoj plej teruraj, gasoj ĉiam pli mortigaj, kaj eĉ mikroboj. Pli kaj pli ŝajnas milito alproksimiĝi. Nebulo kaŝas al la homoj ilian fratecon. Tiuj nebuloj estas antaŭ ĉio nescio, nekono. Kiam la homoj povas bone interparoli, interkompreniĝi, tiam la nebulo malaperos, kaj Paco montros al ni sian afablan, ridetan vizaĝon.

Ĉar Esperanto estas la plej bona ilo por interkompreniĝo, ni, Esperantistoj, ni laboru, ni laboregu por baldaŭigi tiun feliĉan tagon !

ADE.

## La Lingvo Armena

(represo malpermesata.)

Ĝi apartenas al la granda familio de la lingvoj tiel nomataj : "Hindo-Eŭropaj" kaj al la grupo kaŭkaza.

### DEVENO.

La Armenoj pretendas ke ilia lingvo datiĝas de la tempo de ilia praavo Haig, pranepo de Gomer kiu estis filo de Japhet (Jafe). Eĉ kelkaj, troigante kiel estas kutimo en Oriento, konsideras ke ilia lingvo estis la lingvo elparolata de Adamo kaj de Eŭo en la Paradizo !

Malgraŭ tiuj onidiroj, multaj sciencistoj, ĉu armeniaj, ĉu eŭropaj, faris longajn kaj meritplenajn serĉojn pri la deveno de tiu lingvo. Ili



ne sukcesis trovi, en certa kaj firma maniero, kia estis la vera deveno de la lingvo. Tro da mallumo ĉirkaŭas ĝin! Tamen oni ne povas dubi ke la armena lingvo estas unu el la plej malnovaj idiomoj sur nia globo. Longtempe, oni ĝin konsideris kiel la ĝan kaj lastan azian branĉon de la hindo-germanan familio.

#### MALNOVA ARMENA LINGVO.

Ĝi estas la literatura lingvo nomata "Krapar". La Arjaj Armenoj invadis, ĉ. la 6a jarcento antaŭ Kristo, la regionon kie poste ili loĝis, kaj samtempe ili alportis ilian parolatan lingvon.

Antaŭ ol iĝi literatura lingvo, la armena adoptis, kiel ĝiaj frataj lingvoj, kelkajn elementoj de ne hindo-eŭropa deveno (greka, aramea, irana). Pro tio, oni eĉ kredis dum ia tempo ke ĝi estas branĉo de la irana lingvo. Kaj fakte, en ĝiaj radikvortoj multaj similas al tiuj de la medo-persaj lingvoj.

La vortaro montras al ni multajn radikvortojn komunajn al la lingvoj sankrita kaj irana sed ĉefe la nombro-nomoj prezentas en la tri lingvoj: sanskrita, persa kaj armena, vere impresan kaj samtempe kuriozan similon.

Pro la sinsekvaj dominoj de la Asirianoj (Assyriens), Grekoj (Lac<sup>6</sup>-démoniens), Romanoj (Romains) kaj Partanoj (Parthes) sur la armena lando ankaŭ pro la leĝa akcepto en la nacio de pluraj gentoj de fremda raso, sin trudis en la armena lingvo, je tre antikva epoko kaj plue de la jam cititaj ĉi supre, kelkaj terminoj haldeaj (chaldéennes) siriaj (syriaques), latinaj (latines), persaj, tataraj, k.t.p., kiuj tamen ne tre grave ŝanĝis la ĝeneralan karakteron de la lingvo.

#### ALFABETO.

Ĝis tiam, la lingvo armena estis lingvo riĉa, bone formata, sed ĝi estis tamen nur parolata lingvo. Tiam, je la 5a jarcento, pli precize en la jaro 404. Mesrob Maschtotz konstruis la armenan alfabeton parte pere de la grekaj literoj kaj parte de aliaj kiujn li eltrovis. La alfabeto enhavis 38 literojn (30 konsonantojn kaj 8 vokalojn) skribitajn maldekstre dekstren.

Pere de tiu alfabeto kaj kun la helpo de la Katolikos' Sahag Barter (estro de la armena Eklezio), kune siaj disĉiploj, Mesrod Maschtotz ektradukis la biblion (411). Tiu traduko estas kaj restas unu el la plej belaj monumentoj literaturaj de la armena lingvo. Bela kaj tre fleksebla, neniam tiu lingvo tiel bone montris sian riĉecon. Efektive, la armena lingvo enhavas ĉ. 4.000 radikvortojn, kiuj en la vortfarado, sin kombinas inter si kaj formas novajn vortojn, laŭ reguloj similante en tio la regulojn kiujn oni povas observi en duonartefaritaj lingvoj sanskrita, greka, germana kaj Esperanta. Estas ĉefe pro la uzado de afiksoj (sufiksoj kaj prefiksoj) ke la armena lingvo, kiel la esperanta, povas traduki tiel perfekte la plej delikatajn nuancojn de la penso.

Ĝis la XIa jarcento, la lingvo posedis nur majusklaĵajn literojn. Poste oni aldonis minusklajn literojn, formante kvazaŭ duan alfabeton. Ĉar la du serioj da literoj multe malsimilas. Je la origino, la alfabeto enhavis nur 36 literojn. Nur poste oni aldonis la literojn "F" kaj "O".

#### GRAMATIKO.

En la armena lingvo oni ne diferencigas la specon. En la verbo kiel en la substantivo estas nur du nombroj. La deklinacio montras dek kazojn kiuj sin diferencigas per vortetoj kaj prefiksoj. Ĝi enhavas, krom la 6 de la greka kaj latina lingvoj, la instrumentalon de la sankrita kaj de la rusa, la lokativon de la sanskrita kaj fine la narativon kaj la cirkonferencialon kiuj estas specialaj al ĝi. En tiu lingvo kiel en la persa kaj

en la esperanta, la substantiva verbo formas la bazon de la tuta konjugacio kaj oni ĝin retrovas en ĉiuj vortfinaĵoj de ĉiuj tempoj.

#### DIALEKTOJ.

La malnova armena lingvo ne restis la lingvo-finaĵo de la popolo. Ĝi estis precipe parolata de la superaj klasoj de la nacio kaj ĉefe en la regionoj de "Ararat" (hodiaŭ: Erivan) kaj de Daron. La ceteraj loĝantoj parolis plurajn dialektojn kies origino estas la miksaĵo de la armena lingvo kun la dialektoj parolataj de la indiĝenaj gentoj kiam la armenioj konkeris kaj sin trudis en tiun ĉi landon. La indiĝenaj loĝantoj adoptis la vortaron armenan sed konservis la gramatikan strukturon de iliaj primitivaj dialektoj. Tiel sin konstruis novaj dialektoj, karakterizitaj, unue, per vortaro devenante rekte de la malnova armena lingvo, kaj due, per strukturo tute logika, sintakso, konjugacio, deklinacio tute malsamaj al tiuj de la malnova armena lingvo. Tiu lingva fenomeno estis sendube rimarkita de Zamenhof kiu ĝin enmetis ankaŭ en sian lingvon tiamaniere ke vortaro de Esperanto estas ĉefe de hindo-eŭropa deveno dum la strukturo de la lingvo estas nete simila al tiuj de la orientaj lingvoj.

Inter la diversaj dialektoj ni citos la ĉefajn: la dialekto de Centra Armenio nomata Koghthen, elparolata sur la bordoj de l' Araxes kaj kiu estas la plej pura. Tiuj de Gapan kaj de Djoubfah (nomata Dchoughaie-tsi) en la orienta parto de la lando kie estis Armenio, la persaj (iranaj) vortoj abundas en tiu ĉi, kiu estas parolata ĉefe de la Armenioj en Persujo kaj en Hindujo. La dialekto de Cilicio kaj de Eta Armenio, rimarkinda pro siaj gramatikaj formoj sufiĉe malsimilaj al tiuj de la klasika armenia lingvo, kvankam ĝi estas malpli trapenetrata de la turka lingvo. Kaj por fini, jen la du ĉefaj: la turk-armena (okcidente) kaj la rus-armena dialektoj (oriente), kiuj malsimilas en ilia sintakso kaj prononcado sed kiuj povas esti komprenataj reciproke.

Depost ĉ. 100 jaroj tiuj-ĉi du lastaj dialektoj fariĝis la literaturaj lingvoj de la armenianoj. La riĉeco de ilia vortaro grandiĝis pro alprenado de terminoj al najbaraj dialektoj, eĉ kelkefoje al la lingvoj franca aŭ turka. Rimarkinde estas ke la turkaj vortoj estis uzataj nur en la parolata lingvo sed neniam skribe.

Oni tradukis facile, pere de tiuj dialektoj, (kiuj estas kvazaŭ la du naciaj lingvoj de la Armenianoj), la ĉefverkojn de la eŭropa literaturo. Kaj tio estas tute kompreneble: pro la flekseblo en la konstruado de la frazo, kiun oni povas diversmaniere konstrui, (kiel en Esperanto) kaj pro la emo uzi la formojn participajn, la armena (aŭ armenaj) lingvo estas ideala lingvo por la tradukistoj.

Tiuj du lastaj dialektoj, formante la nuntempajn lingvojn armenajn plejparte anstataŭis la antikvan kaj malnovan armenian lingvon kiu estas ankoraŭ uzata nur en la gregoria eklezio.

Claude VERNAY.

## Pompéi

Same kiel la popoloj ŝuldantaj sian prosperon al siaj malvenkoj, Pompéi famiĝis pro sia detruo, kaj ĝia nomo apenaŭ estus menciita en la Historio se Vezuvio iam ne estus furiozinta.

En la jaro 79a post Kristo, vekigis subite la ĝis tiam kvieta vulkano, kiun oni emis konsideri kiel pacan kaj serenam monton tegitan per vinberejoj kaj arbaroj.



Pline, kaj aliaj antikvaj aŭtoroj priskribis la katastrofon.

De la inferna buŝo de Vezuvio longa kolono de fumo altiĝis en la ĉielon, laŭ la formo de giganta arbo, kies foliaro estus el flamoj.

Tondra subbruego treniĝis la teron. Nokto fariĝis en la horo, kiam kutime radias la suno. Pluvego da fandiĝantaj ŝtonoj kaj varma cindro superkovris la urbon per tavolo alta je 6 aŭ 7 metroj. La loĝantoj forfugis esperante savi sian vivon, sed multaj mortis laŭ la vojo al marbordo pro la haladaj vaporoj de sulfuro. Tiuj, kiuj restis en la urbo, precipe ŝtelistoj profite uzantaj la okazon kaj invalidoj, kripluloj, infanoj, ĉiaj malfruintoj, ĉiuj surloke mortis pro sufokado.

Tiu terura katastrofo, unu el la plej grandaj en la mondhistorio heredigis al ni plej valoran postlasitaĵon de la antikvuloj.

La (trikvinone elfosita urbo estas perfekta vidaĵo de civito en kiu vivo subite haltiĝis kaj iomete da imago sufiĉas por kredi sin samtempo de Aŭgusto. Dum nokto de 18 jarcentoj, vualo kovris la urbon, kaj iom post iom, spertaj laboristoj forlevas ĝin kaj liveras tiun unikan memoraĵon al studoj de kleruloj, admirero de artistoj kaj scivolemo de vojaĝantoj.

Pompéi situas 20 kilometrojn de Neapolo. Per la speciale konstruita aŭtostrato, ofte boranta la laŭajn rokojn, ni alvenis en la urbon tra la pordo "Marina" (t.e. pordo al la maro). Proksime de tiu pordo staras la "antiquarium" malgranda muzeo en kiu oni kolektis parton de la trovitaĵoj.

Tuj frapis miajn okulojn mudlaĵoj de homaj korpoj, havigitaj per fluigo de likva gipso en la kavojn postlasitajn, en la cindra tavolo, de la putriĝintaj kadavroj.

Tie estas videble korpo de kripla infano, hundo kun ĉeno ĉirkaŭ la kolo kaj oni "vidas" la klopodojn de la besto por liberiĝo. Maljunulino ankoraŭ enhavas en sia buŝo ŝtofpecon per kiu ŝi esperas defendi sin kontraŭ sufoko.

Plej diversaj objektoj kiel : pesiloj, mezuriloj, vazoj kaj teleroj el vitro aŭ argilo, statuetoj, tualetobjektoj montriĝas al miaj mirigitaj okuloj. En diversaj pladoj estas eĉ duone bruligitaj figoj, prunoj, panoj, ĉiaj komercaĵoj kvazaŭ ili atendus aĉetantojn.

Ankaŭ granda glata vitropeco estas videbla, kio montras ke, en tiu fora tempo, oni scipovis pli lerte prilabori la vitron ol en la mezepoko. Oni rimarkigis al mi falsitajn ludkubetojn (dés pipés) pri tiuj Bulwer-Lytton aludis en sia mondfama romano "La lastaj tagoj de Pompéi".

La stratoj, sufiĉe bone ordigitaj estas mallarĝaj, la trotuaroj altaj ; en kelkaj lokoj, kie la trafiko estis intensa, sur la pavimo restas la post-signoj de la verturilradoj.

Kuriozaj ankaŭ la elstarantaj ŝtonoj sur la ŝoseo, kiuj utilis por transiri la ofte akvoplenan straton. Jen la tiutempaj "najlunitaj pasejoj".

Kvankan Pompei ne estis granda urbo, tamen ĝi enhavis teatrojn, banestablejon, forumon kaj... diboĉejojn ; efektive, oni nun scias ke ĝi estis precipe plezururbo, kie multaj riĉuloj posedis vilaojn. Preskaŭ ĉiuj domoj ne plu havas sian unuan etaĝon, ĉar, konstruita el ligno ĝi forkonsumiĝis. Nur unu balkono postrestis.

En iu domo, iam loĝata de riĉa komercisto, oni klopodis redoni al ĝi ĝian antaŭan belecon, tute rekonstruante ĝiajn difektitajn partojn ; ĉiuj mirinde delikataj pentraĵoj kaj mozaikoj restis surloke. Samaj florspecoj ornamas la ĝardenon kaj en la malnovaj plumbaj akvotuboj novaj kondukiloj trairas kaj ŝprucigas per la statue ornamitaj fontanoj. Tutĉirkaŭe de la ĝardeno estas ĉambroj en kiuj la pentraĵoj konservis sian antikvan freŝcon kaj nekompareblan delikatecon.

En la glora tempo, la Pompeia vivo estis tre vigla kaj agitata, ne nur pro la komercado sed ankaŭ pro la politikado. Sénèque skribis, ke estis pli malfacile fariĝi dekurio en Pompei ol senatano en Romo. Vide-

blaj atestaĵoj pri tiu spirita agitado estas la multaj afiŝoj kaj skribaĵoj pentritaj aŭ perpite gravuritaj sur la muroj. Tiuj skribaĵoj estas plej diversaj, multaj afablaj aŭ ironiaj, jen tipaj ekzemploj :

« Cestilia, reĝino de la Pompeilanoj, dolĉa animo, saluton ! », kaj aliaj malpli bonintencaj : « Samius al Cornelius : Malsaniĝu ! » ; jen malbeno sur la muro de kafejo : « Ci fariĝu mem viktimo de ĉiaj trinkaĵaĵoj » kaj por fini jen unu plena je amara filozofio : « Ho muro, mi miras ke vi ankoraŭ ne rompiĝis sub pezo de tiom multe da stultaĵoj ».

Kaj post vizitado al Pompei, vi estos tute konvinkita ke nenio ŝanĝiĝis en la mondo, krom ke la arto degeneris.

M. DELCOURT.

## POEZIO

Metu en iu el belaj libroj viaj  
Tiu ĉi penson, simbolon de l' Amant',  
Kaj daŭre serĉi vian koron lasant'  
Sian ekstazon surteran aŭ ĉielan,  
Vi nur pripensu momenton idealan  
De plenĉarmaj kaj ravaj sonĝoj niaj.

Claude VERNAY.

## Fédération Espérantiste du Nord de la France

Douai, le 16 mars 1938.

*A Messieurs les Présidents des Groupes Espérantistes fédérés,  
Aux Membres de ces groupes et aux membres isolés de la Fédération.*

*Mes chers Amis,*

L'assemblée générale annuelle de notre fédération aura lieu lors du congrès de Lens, le dimanche 8 mai prochain.

A l'ordre du jour de cette assemblée générale figure la réélection du président et des vice-présidents. (Conformément à notre règlement, ces élections ont lieu tous les deux ans, les années paires ; les secrétaires et le trésorier, élus également pour deux ans, sont réélus les années impaires).

Ainsi que je l'ai annoncé à maintes reprises depuis deux ans, je ne solliciterai pas le renouvellement du mandat de président, que je remplis depuis quatre ans. Ma décision est irrévocable et je prie mes "généralistes" de la fédération de me donner la preuve de leur amitié en n'insistant pas pour me faire revenir sur cette décision. Je n'accepterai pas davantage une prolongation de mon mandat, même à titre provisoire ou intérimaire.

Pendant quatre ans, j'ai travaillé de mon mieux au poste que j'avais accepté et j'ai eu la joie de voir la Fédération du Nord croître en importance, grâce au travail de mes collaborateurs.

Profondément convaincu de la nécessité vitale de maintenir dans nos groupes l'unité et la neutralité, j'ai dû à maintes reprises rappeler



aux uns et aux autres ces principes qui conditionnent à mes yeux les progrès de notre Esperanto, et qui d'ailleurs figurent dans nos statuts fédéraux. Je n'ai pas toujours réussi à imposer mon point de vue, ni été soutenu comme il aurait convenu par ceux qui auraient dû m'appuyer de leur autorité. Je souhaite sincèrement que celui qui, après moi, tiendra le gouvernail de notre fédération conserve les yeux fixés sur ces écueils, contre lesquels risquerait de s'anéantir le fruit d'un travail persistant de trente années.

Je prie les groupes fédérés d'examiner cette situation au cours d'une réunion prochaine, et de désigner dans leur sein un candidat à la présidence de la fédération, après avoir obtenu son acceptation éventuelle. Je prie les membres de ces groupes et les membres isolés — régulièrement inscrits sur nos listes et ayant acquitté leur cotisation de 1938 — qui désireraient faire acte de candidature de ne pas hésiter à le faire également. J'invite les uns et les autres à me répondre sur ce point dans le plus court délai possible et, en tous cas, avant le 15 avril prochain. Je ferai connaître alors le nom des candidats, afin que l'assemblée générale puisse se prononcer, librement et en toute connaissance de cause, le 8 mai prochain.

J'ajoute enfin que ma décision de quitter la présidence fédérale n'indique nullement que je renonce à mon activité espérantiste ; je demanderai en effet à l'Assemblée générale de me conserver, en qualité de membre, dans le comité de la fédération, au sein duquel je m'efforcerai de continuer le bon combat pour une cause qui m'est chère et au succès de laquelle je donne depuis trente ans le meilleur de moi-même.

Albéric HUMEZ,  
Président de la Fédération Espérantiste  
du Nord de la France.  
13 ter, rue Morel, Douai (Nord).

## En la Federacio

### Kunveno de la Federacia Komitato en Douai la 6an de Februaro 1938

Tiu kunveno okazis je la 15a en "Brasserie Moderne" (aparta ĉambrego) sub la prezido de S-ro Albéric Humez.

1. Leterojn alsendis : F-ino Colléatte (Amiens), Sroj Deligny (St-Omer), Perrin (Calais), Flaczynski (Bruay-en-Artois), Simoëns (Tourcoing), Komisie senkulpiĝis : F-ino Barret (Valenciennes), Sroj Houzé kaj Nogé (Dunkerque), Contart (Loos-en-Gohelle) kaj Ges-oj Volqueman dumvoje al la kunveno havis malgravan aŭtomobilakcidenton.

2. Mallongaj fakaj raportoj :

a) La ĝenerala sekretario konstatas ke nia Movado iom malvigligiĝis dum tiu-ĉi jaro. La nombro de la federacianoj malkreskis. Cetere tio evidentiĝas en la raporto de nia kasisto kiu plendas pri malrapida alveno de kotizoj. La grupoj devas ne nur propagandi kaj aranĝi kursojn sed ankaŭ de tempo al tempo organizi prelegon en Esp-o por malnovaj esperantistoj. La federacio disponigas al la grupoj franc- kaj esperantlingvaj prelegantojn ; nur la grupoj postulu ilin. Jus ni ricevis proponon de S-ro Ostensen, norvego loĝanta nun en Nederlando pri la aranĝo de prelegvojaĝo. Li estas ankaŭ Cseh-instruisto kaj povas prelegi kun multaj projekci-bildoj pri Spicbergen, arktika insularo. La ĝenerala sekretario

konfesas ke lia agado lastatempe iom malvigligiĝis. Oni devas senĉese korespondi kun grup- kaj kursgvidantoj, sugesti kaj instigi ilin al vigla propaganda laboro.

b) Detalan kasan raporton legas S-ro Warusfel. Spite de la malrapida alveno de kotizoj kaj plialtiĝo de diversaj prezoj, ni tamen sukcesis ekvilibri la budĝeton. Ni enkasigis 100 frankan subvencion de Norddepartementa Ĝenerala Konsilantaro. Estas dezirinde, ke niaj influhavaj grupgvidantoj klopodu por havigi al nia Federacio ankaŭ subvenciojn de departementoj Somme kaj Pas-de-Calais.

c) Gazetara Servo. Depost 2 jaroj Esperanto-Dunkerque dissendas ĉiusemajne artikolon al 11 adresoj el kiuj 5 radiogazetoj en Parizo kaj al Amiens, Calais, Arras, Dourges, Charleville kaj Dunkerque por 6 lokaj gazetoj. Esp. kroniko aperas regule en tiuj gazetoj. Estas dezirinde ke aliaj grupoj postulu artikolojn pos presigi ilin en diversajn bultenojn profesiajn aŭ de ekslernantoj k. a.

d) S-ro Maurice Nogé, federacia radio-delegito, 21, rue St-Jean en Dunkerque, daŭrigas la senpagan dissendon de informoj pri Esperantodisaĝoj al ĉiuj federacianoj kiuj akceptas konigi al li ĉiudumonate siajn impresojn pri la aŭskultado. Bedaŭrinde, tiuj samideanoj ne estas tre multaj.

e) Kvankam ni ne ricevis raporton pri la fako porinstruista, ni scias, ke en kelkaj urboj oni povas enregistri gravajn sukcesojn. Laŭ la letero de F-ino Colléatte, dank' al favora sintenado kaj efektiva apogo de Academia Inspektoro en Amiens, S-ro Plenneau, Esperanto rapide disvastiĝas en instruistaj rondoj ; kaj li note permesis la enkondukon de Esp.-kurso en la programon de "direktata libertempo" (loisirs dirigés). Sekve de la propono de F-ino Colléatte la Federacia Komitato decidis sendi al S-ro Plenneau dankleteron.

f) Kelkaj libroj de nia biblioteko troviĝas en la manoj de niaj samideanoj jam de kelkaj monatoj. La ĝen. sekretario memorigas ke, laŭ la statutoj de la biblioteko, oni rajtas reteni la prunteprenitan libron nur dum unu monato.

3. La raporto de S-ro Brunet pri la aranĝo de Cseh-kursoj de Arteza Distrikto estis presita en la antaŭa numero de *Nfr. Esp-o*. Ĝenerale oni devas konstati ke tiuj kursoj aranĝitaj en Lillers, St-Venant kaj Isbergues plene sukcesis kaj la federacia Komitato decidis sendi dank kaj gratulleteron al la gvidanto de tiu kurso S-ro Stuit. Li komencis novan kurson en Hazebrouck kaj Aire-sur-la-Lys. En Lillers kaj en St-Venant grupoj estas kreitaj kaj aliĝis al nia federacio. Estas necese ke en aliaj urboj kie funkciis Cseh-kursoj estu kreataj grupoj por daŭrigi nian Movadon.

S-ro Vernay anoncas pri la starigo de nova federacia grupo en Bourbourg.

4. Estas prefere klopodi pri la aranĝo de Esperanto budo ĉe la Komerca Foiro en Lille kiel eble plej frue antaŭ ĝia malfermo. Ni memorigas ke S-ro Aldebert, el Fresnes, estas komisiata pri tiu afero.

5. *Federacia Kongreso en Lens*. — S-ro Max proponas en la nomo de la Kongresa Komitato ke ni ŝanĝu la daton de la Kongreso por ke tiu-ĉi okazu en la epoko de la Komerca Foiro en Lens. Ni akceptas la proponatan daton t.e. la 7an kaj la 8an de majo 1938. S-ro Max konigas ankaŭ la detalan programon de la Kongreso. La komitato aprobas ĝin.

S-ro Léchelle en la nomo de la Esp. grupo en Fresnes-sur-Escaut proponas tiun urbon por la Federacia Kongreso en 1939.



6. *Diversaj demandoj.*

a) La Komitato aprobas la kandidatojn riprezentantojn de la S.F.P.E. en la Komitato de I.E.L. Sro Humez estas komisiata respondi al la cirkulero de la S.F.P.E.

b) La Esp. grupo de Jeumont-Marpent sendis subvencion de 100 fr. je la dispo de La Federacio. La Komitato decidas transdoni ĝin al Nordfranca Esperantisto kaj varme dankas la grupon de Jeumont pro la imitinda ago.

c) Sro Cent. konigas al la Komitato la enhavon de la letero de Sro Ostensen pri la aranĝo de lia prelegvojaĝo. La grupoj dezirantaj ĝin akcepti bonvolos sin turni al la ĝen. sekretario.

d) La grupoj en kies urboj estas garnizonoj estas petataj klopodi por la militistoj. Jam tia kurso sukcese funkcias en Douai, kun 35 lernantoj.

e) La venonta komitata kunveno okazos dimanĉe la 10-an de aprilo en St-Omer okaze de la oficiala malfermo de la Esperanto-fako ĉe la Urba Biblioteko.

Ĉiuj grupoj ricevos detalajn sciigojn kaj programon de la Esperantista Tago en St-Omer.

f) Sro Vernay proponas la presigon de afiŝoj anoncantaj la aranĝon kaj malfermon de kursoj. Tiuj afiŝoj estus vendeblaj al la federaciaj grupoj.

## Komitata Kunveno

### *Karaj Gesamideanoj,*

Ni havas la honoron inviti vin al la Komitata Kunveno kiu okazos la *dimanĉon 10-an de aprilo* en St-Omer okaze de la inaŭguro de la Esperanto-fako de la Urba Biblioteko.

Jen la programo de la Esperantista Kunveno :

Je la 10-a. — En la Komerca Ĉambro, place Victor-Hugo : komitata kunveno de nia federacio.

Je la 12-a. — Inaŭguro de la Biblioteko (donacita de Sro Deligny) sub la prezido de la Urbestro.

Je la 13-a. — Festeno sub la prezido de Generalo Bastien, akademiano, prezidanto de I.E.L.

Aliĝojn oni sendu senpere al Sro Deligny, 4, rue Allent (prezo de la festeno po 22 frj).

Ni instigas niajn gefederacianojn ĉeesti multnombre tiujn kunvenojn-Samideanajn sentojn.

*La ĝenerala sekretario,*

*Le prezidanto,*

J. CENTNERSVER

Albéric HUMEZ.

71, rue de Lille, Valenciennes

## TAGORDO DE LA KOMITATA KUNVENO

1. Legado de la ricevitaj korespondajoj ;

2. Mallonga raporto pri la funkciado de ĉiuj fakoj de la Federacio : (ĝenerala sekretariado, kaso, izoluloj, radio, gazetaro, biblioteko, ekspozicio, instruistoj) ;

3. Rezultatoj de la klopodoj por la aranĝo de Esp. budo ĉe la Komerca Foiro en Lille ;

4. Ĝenerala Kunveno de la Federacio en Lens dum la Kongreso. Starigo de la tagordo de tiu Kunveno ;

5. Diversaj demandoj.

La komitatanoj kaj grupgvidantoj kiuj ne povos ĉeesti la kunvenon estas petataj sendi reprezentanton aŭ konigi perletere siajn opinionojn kaj sugestiojn al la ĝenerala sekretario.

## Esperantista Biblioteko en Saint-Omer

La esperantista fako instalita en la urban bibliotekon de Saint-Omer, kiu oni inaŭguros la 10-an de aprilo 1938, entenas du partojn :

I. — La biblioteko, kiu enhavas 1500 numerojn, inter kiuj estas :

(a). La unuaj lernolibroj franca kaj pola, eldonitaj en 1887 sub la pseŭdonimo Dro Esperanto ;

(b). La unuaj lernolibroj angla kaj sveda, eldonitaj en 1889 sub la pseŭdonimo Dro Esperanto ;

(c). Multaj originalaj verkoj kaj tradukoj de variaj literaturoj ;

(d). Lernolibroj en ĉirkaŭ dudek lingvoj ;

(e). Multaj revuoj kaj ĵurnaloj

(f). Protokoloj de kongresoj universalaj, naciaj, regionaj ;

(g). Lernolibroj de ĉirkaŭ tridek provoj de internaciaj lingvoj : sol ré sol, volapük, ido esperantido, idiom neutral, romanal, interlingua, langue bleue, kosmoglotta, occidental, nov-latin, k. t. p.

II. — Manskribaĵoj :

(a). De Dro Zamenhof :

Multaj leteroj kaj poŝtkartoj ;

Pri mia vivo ;

Projekto de deklaro pri esenco de Esperantismo ;

